

Kulturaj Kajeroj

E.MAHE

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1979 - 6

KULTURAJ KAJEROJ

1979 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Jubileo inter aliaj : Abelardo kaj Heloisa B. Cheverry

Foto en Esperanto kaj Esperanto tra foto H. Boyet

Kia infaneco signas infanaron F. Boyet

Glaciaj eraoj

Mihai Eminescu C. Dominte

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Reveninte hejmen de la Pariza kunveno kiu leĝe naskis la Asocion « Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj », H. Micard estis prezidanto de asocio kun belaj statutoj kaj mirindaj projektoj kaj celoj. Sed ĝi ne havis domon kaj posedis nur malgrandan kapitalon. Denove la aŭtomobilo de H. Micard trakuris la kamparon ĉiuĵaŭde. Denove la anoncoj en la gazetoj estis atente studataj ĉiuvespere. En la novembra numero de « Esperanto-Lernejo » Micard skribis : « Mi vizitis plurajn bienojn. Mi skribis kelkajn dekojn da leteroj kaj mi ricevis multnombrajn proponojn. Oni certe diris al vi, kiel al mi mem, ke grandaj domoj kaj kasteloj estas malfacile venditaj. Mi kredis tion sed pluraj kasteloj estis aĉetitaj antaŭ mi je tre altaj prezoj ».

Komence de oktobro estis sendita la unua « oficiala » cirkulero al la administra konsilantaro :

« Mi ne kutimas longe insisti pri la pasintaj eventoj kaj laŭ mi Brulon estas pasinta. Tuj kiam mi ekvidis, ke la afero verŝajne fiaskos mi denove serĉis. Mi vizitis apud La Flèche grandan domon, kiu taŭgus ; la prezo estis proksimume la sama, kiel en Brulon sed la bieno situas en la kamparo kaj ne estas sufiĉe alloga kaj plaĉa. La 18-an de oktobro mi vizitos du kastelojn : la unua 2 kilometrojn for de Baugé, la dua en la urbo mem. Unu kostus du milionojn kaj duonon kaj la alia tri milionojn. En ambaŭ estas sufiĉe da loko por loĝigi kvindek personojn sen plia konstruaĵo. Mi komunikos al vi la rezulton de mia vizito. Ĉu vi opinias, ke ni povas elspezi 3 000 000 frankojn anstataŭ 2 500 000 ? Ni nun havas en nia kaso 1 600 000 frankojn kaj 200 000 frankoj estas promesitaj ».

La 18-an de oktobro estis ĵaŭdo, senlerneja tago. La bienvendisto kondukis ge-sroj Micard al Baugé por viziti la proksiman kastelon, kies nomo estis Grésillon. Veturante sur la aleo, kiu iras al la kastelo, kaj vidante tiun belegan domegon, gesinjoroj Micard rigardis unu la alian : « Tiu vizito estos, kiel la aliaj, ili pensis, senrezulta. Tiu kastelo estas multe tro bela ; neniam ni povos aĉeti ĝin ». Ili tamen vizitis kaj ilia unua impreso plifirmiĝis.

Kiel promesite H. Micard sendis duan cirkuleron :

« Hieraŭ mi vizitis la kastelon Grésillon 2 km de Baugé, urbeto kun 3 500 enloĝantoj, sur la fervoja linio Le Mans-Saumur. Forirante de Parizo je la 19-a horo oni alvenas en Baugé je la 22-a duono. Estas aŭtobusoj de Angers kaj Tours. La regiono estas agrabla. La kasteloj de la Loire-valo estas proksimaj. Malagrablaĵo por mi mem : ĝi situas je pli ol 50 km. de mia vilaĝo. La konstruaĵo estas duetaĝa kun pli ol dudek ĉambroj. Estas lageto trafluita de rivereto. Ni povos aranĝi banejon. Estas ankaŭ vasta ĝardeno kaj kampoj. Multo estas farebla en la estonteco. Sed estas neniu elektra lumo en la kastelo kvankam la linio ekzistas. Ekzistas puto sed ni bezonos elektran motoron por elpumpi la akvon. La ĉambroj ne posedas lavujojn. La bieno konsistas, krom la kastelo, el 13 hektaroj da kampoj kaj 15 hektaroj da arboj. La vendistino postulas 8 500 000 frankojn sed ni povos aĉeti nur la kastelon kaj 8 hektarojn por 3 300 000 aŭ 3 200 000 frankoj. Mi fotografis la kastelon kaj mi preparas artikolon por « Esperanto-Lernejo ».

Jen la financa situacio : en la kaso 1 664 900 frankoj ; 316 000 estas promesitaj. Sindonema kamaradino metis je nia dispono 200 000 frankojn. Se ni trovos dek aliajn, ĉio estos bona. Mia lasta alvoko alportis kelkajn monoferojn. Sed estos necese alvoki la esperantistajn grupojn se ni aĉetos la kastelon.

Aldono : Estas varmiga hejtotubaro en parto de la kastelo.

La prezidanto
H. Micard

Sekvota

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso en Stokolmo (2a - 9a de Aŭgusto 1980) :

— La kongresa temo estos : « Diskriminacio » ; La programo enhavos erojn pri diversaj formoj de diskriminacio : rasa, seksa kaj lingva.

— La brancoj de la belartaj konkursoj estos : poezio, prozo, eseo, teatraĵo, porinfana literaturo kaj fotografio.

Instruista simpozio en Soborno :

Tritaga simpozio, organizita de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.), okazis inter la 18a kaj la 20a de Oktobro en la lingvistika fako de la pariza universitato Sorbono. Ĉeestis 38 personoj el 8 landoj. La temo de la simpozio estis : « Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia eŭropa lingvo ».

— La 14a Internacia Konferenco de I.L.E.I. okazos inter la 24a de Julio kaj la 1a de Aŭgusto 1980 en Cottonera (Malto).

Esperanto-elsendoj ĉiutage en ĉina radio :

Depost la 30a de Oktobro, la elsendoj en Esperanto el Ĉinujo okupas semajne 10 horojn kaj duono. Ili okazas trifoje tage. Unu triono de la tempo celas Eŭropon, kaj la cetero estas direktata al orienta kaj sudorienta azio. Por Eŭropo, la dissendoj okazas je la 20a ĝis la 20,30a (horo de Greenwich). Ondolongo : 43 kaj 31 metroj. Frekvencoj : 6860 kaj 9380.

La esperantista kabaredo en Parizo :

La spektakloj de « La Ruza Kruĉo », la esperantista kabaredo en Parizo, okazas nun en la restoracio « L'Emeraude », 35 boulevard Bourdon, 75004 Parizo, Metroo Bastille.

La spektakloj komenciĝas je la 21,15a, je la jenaj plej proksimaj datoj : 19a de Februaro, 18a de Marto, 22a de Aprilo, 20a de Majo, 17a de Junio.

Prezo : 13 FF (kun trinkaĵo), 20 FF (kun alkoolaĵo).

Ekde la 19a horo, oni povas vespermanĝi por modera prezo.

Adreso de la respondeculo : Jak Le Puil, 5, Place Lavoisier, 93380 Pierrefitte.

Renkontoj kaj kongresoj en 1980 kaj 1981 :

— La organizado de la universala kongreso 1981 en Brazilio jam komencis. Tiu kongreso okazos inter la 25a de Julio kaj la 1a de Aŭgusto 1981 kaj la nunaj aliĝprezoj valoras ĝis la 9a de Aŭgusto 1980.

— Oni konfirmis la datojn de la junulara kongreso de T.E.J.O., en Rauma (sudokcidenta Finnlando), de la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto 1980, kun, poste, ebleco vojaĝi per ŝipo rekte al la universala kongreso de Stokolmo.

Temo de la kongreso : « Popola kultura tradicio en la nuntempa mondo ». Cetere, samepoke, okazos tradicia somera festo en Rauma.

Adreso de la loka kongresa komitato de la 36a I.J.K. : Anundilankatu 3, SF - 26100 Rauma 10, Finnlando.

— Fervojista Kongreso, en urbeto America, ne malproksime de Eindhoven (Nederlando), 16a - 22a de Majo.

— Internacia Junulara Festivalo, en Firence, Italio, 3a - 7a de Aprilo.

— Universitataj semajnoj, en Primoŝten (Jugoslavio), ĉe Adriatika Maro, 12a - 25a de Julio.

— Dua Pacifika Esperanto-kongreso (samtempe kun la usona kaj kanada kongresoj), en Vancouver (Brita Kolombio, Kanado), 26a - 29a de Julio.

La lingvaj problemoj kaj la olimpiaj ludoj :

Dum intervjuo, S-ro Ignaty Movikov, prezidento de la organiza komitato de la olimpiaj ludoj, en Moskvo, dum proksima somero, deklaris : « La ĉefa obstaklo kiun ni devas ankoraŭ transpasi estas la lingva baro inter ni kaj la vizitantaj landoj. Ni devas trejni grandan nombron da interpretistoj kapablaj labori en sammomenta tradukado, kaj tio ne estas malgranda afero ».

— Ĝuste, « Hungara Vivo » publikigis la deklarojn — tre favorajn al adopto de Esperanto — de konataj sportistoj hungaraj kaj sovetaj.

La esperantistoj de Tria Mondo bezonegas helpon :

La revuo de U.E.A. « Esperanto » de Novembro aperigis artikolon de Prof. D-ro Patricio Zurita, estro de la Fiziologia Instituto de Kito (Ekvatoro). Tiu artikolo de eminenta kaj agema esperantisto de Sud-Ameriko reliefigas denove la fakton ke la manko de libroj, propagandiloj, revuoj, grave bremsas la disvolviĝojn de la internacia lingvo en la Tria Mondo.

Jen la adreso de S-ro Zurita : Facultad de Ciencias Médicas, Universidad Central del Ecuador, Quito, Ekvatoro.

En la Akademio de Esperanto :

S-ro William Auld, la konata esperantista verkisto estis elektita prezidanto de la Akademio de Esperanto. La vicprezidantoj estas Prof. Paul Neergaard kaj Prof. Stojan Ĝuĝev. La nova sekretario estas D-ro Albert Goodheir.

Pupteatra Internacia Festivalo :

Tiu 12a pupteatra festivalo okazis, kiel la antaŭaj, dum Oktobro, en Zagrebo. Oni scias ke la pupartistoj devas paroli en Esperanto.

Ses altnivelaj trupoj el diversaj landoj partoprenis. La organizantoj esperas ke, estonte, la esperantistoj iom pli interesiĝos pri tiu kultura unika festivalo.

En Rumanio :

La kolektivo Esperanto-Interlingvistiko, organizaĵo de la rumanaj esperantistoj, kiu funkcias en la kadro de la Rumana Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj, kunvenis dum Septembro en la Universitato de Timisoara, kun reprezentantoj de 14 filioj de la kolektivo. 18 sciencaj komunikaĵoj estis prezentitaj.

La Muelejoj de metilernantoj :

Tiu asocio, kiu multe favoras Esperanton, riparas malnovajn akvomuelejojn en la centra Francio (ĉe la rivero Creuse), kun la helpo de junaj volontuloj (metilernantoj aŭ ne).

La gejunuloj kiuj ŝatus partopreni tiujn laborajn restadojn, dum la somero, kaj eventuale kunlabori samtempe por instrui Esperanton estas petataj rilati rapide kun H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

JUBILEO INTER ALIAJ : ABELARDO KAJ HELOISA

Jaron post jaroj, okazoj ne mankas por reveki la memoron de vivantuloj pri famaj forpasintoj. Bone ! Tiel, herooj pli malpli forgesitaj, subite — eĉ se nelonge — retrovas iun vivecon dank'al oficialaj omaĝoj al ili redonitaj.

Hodiaŭ, ni eĥos pri celebrado, en 1979, de la 900-jara datreveno de Abelard' Kial ? Unue, ĉar ni kredas ke am-rakontoj ĉiam estas plaĉemaj. Ĉefe, ĉar niaj samideanoj en Franc-okcidenta regiono, ekzakte en « Le Pallet », naskiĝurbeto de Abelardo, apud Nantes, aktive partoprenis en la rememor-festoj, surloke mem, kaj per esperantaj eldonaĵoj.

Sed, kiu estis Abelardo ? Ĉu nur amanto alfruntita, kune kun la amatino, al terura sorto-bato kiu dumlonge inspiros multajn francajn verkistojn : Inter aliaj la famaj Francisko Villon kiu, en la 15-a jarcento, alvokas al Heloisa en sia balado al « Damoj de la foraj tempoj » kaj, en la 18-a J.-J. Rousseau (Ruso) kiu titolis unu el siaj verkoj : « Julia aŭ la nova Heloisa » ? Verdire, Abelardo plue famiĝis kiel teologisto, skolastika filozofo. Li instruis en diversaj francaj centroj, ĉefe en Parizo. Li estas aparte konata pro konceptoj plej progresemaj — rilate la epoko — kiuj kaŭzis al li ekleziajn kondamnojn : unu de la Koncilio de Soissons en 1124, dua, instige de sankta Bernardo en Koncilio de Sens, en 1140. Abelardo estis unu el la kreantoj de doktrino konigita sub la nomo de « konceptismo ». Ankaŭ konvenas situi lin en tiu parto de la franca mezepoka periodo nomita la « Heroa Jarcento », kiam la socia ekvilibro baziĝas sur la lojaleco al Dio kaj al feŭdaj nobelsinjoroj kies kastel-fortikajoj, dum pacaj tempoj, estis malfermataj al la ĉi-epokaj artprezentaĵoj, el kiuj la literaturo, fare de trobadoroj.

Estas la tempo de heroa entuziasmo al kavalira epoko de Karlo la Granda, kun la « ag-kantoj », al Krucmilitaj epopeoj, al kortuŝaj rakontoj, kiel la legendo de Tristano kaj Izolda. Aliflanke, facile imagebla estas la emo, ne nur de la trobadoroj, ankaŭ de saĝaj monaĥoj aŭ de maljunaj druidoj, al idealigo, cele al pli forta impresigo de la aŭskultantoj pere de eksterordinaraj pasioj, de nevenkebla geamo, fidela kaj vivanta eĉ post la morto de unu el la geamantoj.

Impresita, aŭ ne, de tia literaturo, Heloisa, 17-jara studentino, oferdonos sian junecon al jam matura sed famkonata profesoro. Ĝismorte, ŝi restos fidela je sia unua kaj unika amimpeto iĝanta pasia amoro elkore duobligata de tiu de Abelardo al ŝi : Ambaŭ am- kaj amor-inklinoj sekvotaj de plej profundaj intelektaj sentoj ĝisfunde eksploritaj de la du geamantoj kaj notitaj en leter-korespondado, latinlingva, poste tradukita en franca kaj aliaj lingvoj. Tiu-ĉi leter-interŝanĝo permesis konservi por la posteularo ne legendaron pli malpli romaneskan kiel tiu de Tristano kaj Izolda sed verajon pri la riĉeco, la suferoj kaj la ĝojoj de profunda, komuna amego kaj ties dramo.

Laŭdire, la gepatroj de Abelardo posedis bienon kaj loĝis en « Le Pallet », unu el la defend-punktoj sude de la Nantes-grafolando : Loko staranta sur verdaj montetoj nun ĉefe konataj pro la bonega « Muscadet-vino », tie-ĉi rikoltata.

La patro, militisto, tre ĝojis je naskiĝo de unua infano, plue virseksa. Oni baptonomis la bebon : Petro. Kreskiĝante, la knabo trovis sur la kamparo kunludantojn ankoraŭ pli bruemaj kaj batalantaj ol la nunaj. Ja, ĉe tiu epoko, kiam laŭlonge de tuta vivo oni devis surporti ĉiuspecajn trudaĵojn, naturajn kaj sociajn, tre junaj oni devis, diversmaniere, pretiĝi je luktoj iu ajn kun akra, sola deziro : resti plej forta, vivi, pluvivi, do lerni batali por defendi sin mem, siajn kunulojn kaj subulojn. Vole, nevole, knabo devis prepari sin al bataloj kaj, ofte, en pli, malpli riĉaj familioj, iĝi militisto.

La juna Petro ne elektis tiun vojon. Plue, li rezignis, favore al la sekvanta frato, pri tiama rajto de unua naskita filo donanta al tiu-ĉi la ĉefon de la gepatraj heredaĵoj... kun multe da familiaj devoj ! Li sin dediĉis al studoj : por li alimaniere superi aliajn ? Jen li, 15 aŭ 16-jaraĝa, survoje al klereco, pli altirata de filozofiaj studoj, ol de aventuroj iuj ajn. Ĉe tiu epoko, studentoj serĉantaj la plej bonajn profesorojn multe vojaĝas tra la lando, haltas en konataj instrucentroj... ĝis Parizo, kie, jam estis plej famaj Universitatoj. En ties lernantaron nepre deziras enskribiĝi Abelardo por, siavice, brile lerni, sukcesi, havigi al si profesoran katedron. Kial tiu nova nomo, kaj ne plu Petro ? Reale, student-ŝercaĵo kiu famiĝos ! En iama dialekto, Abelard estas la hundo ĉiam avida, ĉiam preta engluti ion ajn disponeblan. Petro, lojala kunludanto, akceptas la krom-nomon, konservas ĝin dumvive... eĉ postmorten !

Heloisa estas ankoraŭ ne eniranta liajn vivon kaj koron. Tamen, maŝon post maŝo, fato teksas la du homdestinojn. La deziratan profes-postenon Abelardo konkeras.

En ĝi, majstre li levos neatenditan intereson kaj sukceson. Pluraj miloj da lernantoj vizitos liajn kursojn. Kaj, nekredeble por ni, dudekjarcentuloj, kiuj volonte supozas, ke dum Mezepoko la sola rolo de virino estis obeo kaj submeto al viro, inter la lernantoj de Abelardo estas juna fraŭlino, el nobela familio, klera, brila, ĉarma : Estas la alloga Heloisa. Majstro Abelardo tuj revas konkeri la junan belulinon ankaŭ klerulinon. Konsekvence, baldaŭ la onklo de Heloisa, nomita Fulberto, kaj kanoniko en la monaĥej-kulturcentro gastigos novan luprenanton, kies lecionoj, tutcerte, devas rapide progresigi en sciencoj, saĝeco kaj prudento lian nepinon. Tiel, majstro kun multaj disĉiploj tamen iĝos privata repetitoro.

La sekvon oni facile divenas : La deksep printempojn de Heloisa ne povis trejni mezaĝa fortulo nur en filozofiajn abstraktaĵojn ! Kunigitaj en sama loĝejo per studoj kaj kor-amo, la geamantoj konas perfektajn ĝuojn. Ve ! Iun nokton, la onklo Fulberto malkovras la trompon al li faritan. Li forpelas Abelardo kaj trude izolas la nepinon. De tiu momento, la du geamantoj povas komuniki nur per biletoj sekrete transdonitaj de unu al la alia. Tiamaniere, Abelardo scias pri la gravediĝo de Heloisa. Li ne perdas tempon. Tuj, li organizas reprenon de sia amatino por, ke ŝi fuĝu al Bretonio, vestita kiel religiulino. Ambaŭ restadas en Le Pallet ĝis la naskiĝo de la infano, virseksa, kiu ricevos la baptonomon Astrobalo kaj, laŭdire, iĝos, kiam plenkreskulo kaj klerulo, kanoniko en la Nantes-katedralo.

Reveninte en Parizo, tutkompreneble, Abelardo devas frunti al la kolero de la onklo Fulbert, kiu postulas riparon. Bone : Oni povas akordiĝi, interkonsentante pri sekreta geedziĝo, sed, la kolerema kaj venĝema onklo tiel distrompetas la aferon ke la profesora prestiĝo de Abelardo multe suferas : Estas granda skandalo en klerika medio ! Tiam, por kvietigi la onidirojn, Abelardo enirigas la junan edzinon en monaĥejo. Denove Fulberto malkontentiĝas. Li imagas neripareblan venĝon, persvadata ke kulpulo nepre devas ricevi punon en rilato kun la peko. Li rekrutas sbirojn, subaĉetas servistaĉulon de Abelardo, la malbonŝanculo, kiu, iumatene vekiĝos eŭnuko !

Kiam la emocio kaj rankoro naskitaj de tia sovaĝa atenco estis pli malpli foraj, Abelardo devis, tamen, frunti al nova situacio. Unue, li, tiutempe idolo de la pariza intelektularo, decidis iĝi monaĥo en la reĝa abatejo « Sankta Denizo », ne en Parizo mem. De tiam, for unu de la alia pro la distanco, for unu de la alia pro la « akcidento » suferita de Abelardo, la geamantoj, spite al ĉiuj sortobatoj, rekonstruas harmonian kaj fidelan paron, sublimigante la novan situacion. Tutkore, kvankam sekrete kaj de malproksime, la monaĥa edzino sekvos la edzajn aventurojn : Intelektajn, estetikajn aventurojn, kompreneble ! Ja, Abelard ne povis kaj ne volis rezigni pri sia forta personeco, pri siaj sukcesaj tezoj, kaj aliaj intelektaĵoj.

Tio revenigas nin al tiu dek-dua jarcento kiu ne estis tiel obskura kiel oni tro facile tendencas supozi. Jam, kelkaj hom-pensoj estis tute okupataj pri solvo-provoj de diversaj problemoj, ĉefe religiaj kaj intelektaj. Neeviteble, tiam kiel ĉiam, tiaj serĉadoj ne iris sen dialektikaj kvereloj ! Aparte distingiĝis Abelardo en la tiel nomita : « Kverelo de la Universitatoj » kiu oponis teoriistojn kontraŭ mistikuloj el kiuj Sankta Bernardo de « Clairvaux » kiel ĉefo. Kondamnata, Abelardo devos trovi refuĝejon en Ĉampanion. En proksimeco de Trojo (la franca urbo Troyes) li kreos ermitejon « Le Paraclet » tre rapide transformata en kampara Universitato, kiun, tamen, li devos forlasi. Oni elektas lin kiel ĉef-abato en Bretonio. Ve ! Ankaŭ tie, nova sorto-bato ! La monaĥoj provas mort-venenigi lin ! kaj, iom poste, li devas fuĝi por eviti ponard-murdon !

Heloisa intense partoprenas ĉiujn avatarojn de la edzo, kiun ŝi vere adoras per senlima amo. La edzo redonas al ŝi samajn markojn pri amo kaj fideleco. Kiam Heloisa kaj ŝiaj kunulinoj estos forpuŝataj el la virina monaĥejo, tiam Abelardo instalos ilin en « Le Paraclet ». Li redaktos specialan regulon por la nova komunumo kaj zorge atentos pri la bona funkciado de la religia establo, aliparte tre bone estrita de Heloisa. Laŭlonge de admirinda interkorespondado, Abelardo deziras kontribui je la feliĉo, la ekvilibro, la savo de la ĉiam amata edzino.

Lasinte Heloisa en « Le Paraclet », ni povas retrovi Abelardo, kiu por perlabori sian vivon denove instruas kaj verkas. Ve ! Denove liaj verkoj estas kondamnataj de la tiama Eklezio. Denove, li devas batali ! Lastan fojon, li interrenkontiĝas kun Heloisa por, el tiu kontakto, retrovi la necesajn fortojn kaj ne malesperi. Lia koro restas arda, la spirito vigla, jes. Tamen la dumvivaj, konstantaj kaj akraj kontraŭbatoj, tiel korpaj kaj mensaj, rapide ŝanceligas la sanon de tiu viro, maljuna antaŭ la konvena aĝo kaj daŭre rankora kontraŭ la vundo al li altrudita.

Survoje al Romo, li rezignacios. Li haltas ĉe amiko en la monaĥejo de Kluni.

La komprenemo, la bonkoro de la religia frato dolĉigos, fine venkos la venĝemadon de Abelardo. Tie-ĉi li repaciĝos kaj serene mortos 63-jaraĝa.

La superulo en Kluni redonos al Heloisa la senvivan korpon de la « homo kiu estis ŝia » li diras, elkore asertante pri Di-pardono.

Heloisa mortos nur 22-jarojn poste, naskante legendon kiu asertas, ke ĉe la malfermo de la ĉerko de la unue mortinta, por eterna kunligo de la du kadavroj, tiu de Abelardo malfermis al ŝi la brakojn.

Ambaŭaj korpoj — aŭ cindroj — estis deponataj en « Le Paraclet ». Je tiu loko, ses jarcentojn poste oni starigis novan tombo-monumenton kiu, dum la Franca Revolucio, estis transportita en muzeon nomita « de la Aŭgustanidoj » (des Petits-Augustins) kaj pli poste, en 1817, en la Pariza tombejo nomita « Père-Lachaise ». Ĉi-okaze, tiama skulptisto, Aŭgusto Lenoir, alportis al la memormonumento novajn ornamaĵojn laŭ la ĉi-epoka neo-gotika stilo. Tamen, li inkrustis en ili erojn de skulptaĵoj el ruinoj de la malnovaj monaĥejoj, kie vivis Abelard kaj Heloisa.

Daŭre, do, restas en Parizo memoraĵo kiu, al pasantoj, kuriozemuloj aŭ sentimentalaj vizitantoj, povas atesti pri profundeco de ge-amego, kaj ties supervenko spite al plej akraj sorto-batoj.

(eltiraĵo el prezento en Gresillon)

Kompilis B. Cheverry.

FOTO EN ESPERANTO KAJ ESPERANTO TRA FOTO

Dum la tria somera periodo, en la esperantista kulturdomo, io nova okazis : oni ne plu studis matene kaj posttagmeze en kursoj, kiel dum la antaŭaj jaroj. Ĉi jare, oni provis uzi la internacian lingvon en konkreta realeco pro du kialoj : unue, homoj deziras profiti siajn feriojn por studi Esperanton sed tamen ne konsentas seniĝi je distraĵoj malpli cerbaj ; due, iuj personoj emas al konkretaĵoj kaj ne tiom al mensa harfendado : tiujn homojn oni logas al Esperanto tra iu mana aktivado. Kelkaj partoprenantoj en la periodo, kiuj venis por la lingvo, havis okazon ĝin praktiki ĉirkaŭ perlotredada tablo, lernante dancojn aŭ fotarton. Aliflanke, tiuj, kiuj interesiĝis precipe pri la konkretaj programeroj troviĝis en Esperanto-parolanta etoso kaj sentis sin devigataj uzi la internacian lingvon.

Fakte, oni miris aŭdi tiom malmulte da krokodilòj : en ĉiuj laborĉambroj, sed ankaŭ en la salonoj, kie la homoj amike babilis dum aliaj laboris, kaj dum la postvesperarangaj trinkadoj, verda anĝelo etendis siajn flugilojn super ĉies kapon.

En la zorge ŝlosita fotlaborejo, la homoj aŭdis la paroladon de plilertuloj kaj laŭ la metodo de cerblavado, la gramatikaj eraroj estis senkompate korektitaj : la korektitoj duonkonscie registris la ĝustan formon, ne ĉesigante sian laboron, kaj post kelkaj tagoj konstateblis, ke la eraro malaperis ! Paradokse, kursoj okazis dum nur duono de la tempo, sed la lingvon oni multe pli aŭdis.

Tiu rezulto kuraĝigas por daŭrigi la eksperimenton, tiel ke la domo estu vere « kultura ». La ĉeestantaro ne multe ŝanĝiĝis, sed jaron post jaro, espereblas, ke ĝi renoviĝos : tiu nova stilo, pli vivoplena, certe allogos gejunulojn.

H. Boyet.

Kia infaneco signas infanaron ?

1979 estis la « jaro de la infano », sed, laŭ la nacilingvaj esprimoj, oni povas diverse kompreni la vorton : « infano » ; ĉu temas pri la karaktero komuna al ĉiuj infanoj, tio estas : « infaneco », ĉu temas pri la tuto de la infanoj, la infanaro, rigardata kvazaŭ ĝi popolo estus ? Kaj, je tiu punkto de la pripensado, oni povas sin demandi, ĉu la infanaro, kiu estas konkreta realaĵo, vere respondas al homogena amaso, kies eroj havas samajn karakterojn, tiuj de infaneco ? Por esplori tiun demandon, mi unue revuos la statusojn de la infanoj en la diversaj homaj socioj, kaj due mi provos listigi la sciencajn karakterojn de infaneco por rilatigi ilin kun la statusoj ; fine mi prezentos problemaron, kiu rilatas al la nuna situacio de la infanoj, kaj kiu pravigas la ekziston de jaro de la infanaro.

La infano kaj la socio.

Kiam oni superrigardas la diversajn statusojn de la infanoj en la socioj, oni povas opozicii du situaciojn, kiujn mi karikaturos per tiu esprimo : « de la sklava infano al la reĝa infano ».

La sklavigita infano.

En la diversaj socioj, kiuj antaŭas tiun de la 18-a jarcento en Eŭropo, la infanoj estis rigardataj kiel ankoraŭ nekapablajn homojn, kiuj povas pli malpli partopreni la taskojn de la plenkreskuloj, kaj devas, kiel eble plej rapide fariĝi kompletaj kunlaborantoj. En la plej primitivaj socioj, kiam la viroj rikoltis kaj ĉasis, dum la virinoj zorgis pri manĝaĵoj kaj vestoj, tiam la infanoj restis kun la virinoj, for de la viroj kaj de iliaj pli malpli magiaj ritoj. Iam, en la junaĝo, la knaboj ricevis specialan magian edukon, kiu permesis al ili eniri la grupon de la viroj, kaj de tiam, partopreni plenrajte.

En la urbaj civilizacioj, kie la profesioj estis multe pli diversaj, kie ekzistis klasoj kaj kastoj tute apartaj, la infanoj ricevis destinojn ankaŭ diversajn. En la malriĉaj klasoj, kie la homoj devis uzi kiel eble plej frue la helpon de la infanoj, nur la tre junaj vivis kun la virinoj, de kiuj ili estis prizorgataj, sed kiel eble plej baldaŭ ili fariĝis helpantojn, aŭ sur la kultivataj kampoj, aŭ apud la brutaro, aŭ en la laborejo de metiisto. Tiu helpo estis samtempe preparo al laboro, kaj pro tio, la geknaboj estis ne malofte senditaj al « mastro », kiu samtempe estis instruisto pri la profesio, kaj labordonanto por malbone pagitaj kunlaborantoj-lernantoj. Kiam la gepatroj estis riĉaj, tiam la infanoj povis ĝui pli longan edukon, sed ĉiam cele al profesio. Ĝenerale, nur la knaboj ricevis edukon preparantan al profesio, iam en la greka gimnazio por iĝi lertaj soldatoj, iam en religiaj medioj por iĝi pastroj, iam en lernejoj por iĝi juristoj, politikistoj, komercistoj k.t.p.

Tia situacio, en la regionoj, kies historion oni detale konas per skribitaj tekstoj, ekzistis en la orientaj imperioj, en la greka, kaj poste en la romia civilizacioj. En la Eŭropa mezepoko, la plej kleraj kaj riĉaj sociaj tavoloj malaperis, sed fundamente, la socia strukturo restis sama ĝis la 18-a jarcento. Kiel ni vidos aliloke, estis granda evoluo en Eŭropo inter la 16-a kaj la 18-a jarcentoj, sed eĉ en la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcentoj, tiu sklavigo de la infanoj daŭris en la malriĉaj klasoj. Spite al filozofiaj tezoj, la ekonomia premo devigis la familiojn al tiu ekspluatado de la infanoj.

Resume, oni povas klarigi tiun bildon per du ideoj : unue, la infanoj estas malfortaj homoj, kiuj kostas al la dunganto, kaj kiuj, pro tio, devas kiel eble plej labori, tio estas la sklava bildo de infanoj ; due, la infanoj estas estontaj homoj, kiujn oni tre zorge preparas por la ekonomia rolo en la socio. Utilas rimarki, ke tiu sklava karaktero ligiĝas al malriĉeco de la socio ; la infanoj de riĉuloj, kvankam ne perfektaj homoj, tamen disponis pri iom da libera tempo. (Ili estis liberigitaj, laŭmezure ke iliaj gepatroj povis aĉeti sklavojn aŭ servutojn ĉe tiucela vendejo).

Kiu filozofio pravigas tiun situacion ?

Baze de filozofio, ĉiam kuŝas ekonomiaj kondiĉoj, mi jam montris, ke en la malriĉaj medioj, la frua uzo de infanoj en la produkto estis necesa. En la riĉaj klasoj de la imperioj, dank'al sklavigo de aliaj popoloj, tiu neceso estis malpli urĝa, kaj nur tiu « riĉeco » permesis tiam pripensi pri « homa klerigado » fare de filozofoj. En la antikvaj civilizacioj, la filozofoj elpensis klerigadon pure homan por la riĉuloj, kiuj povis atendi antaŭ ol uzi la laborforton de la junaj homoj.

Sed poste venis, en la romia imperio, la kristana influo, kaj dum la mezepoko restis nur la kristana filozofio en Eŭropo. Post la mezepoko, en Renesanca periodo, denove kleruloj pensis pri pure homa edukado, sed restis du obstakloj : la malriĉeco, sed aliflanke la kristana filozofio, pri kiu necesas paroli.

Por la kristana filozofio, la homo estas kreita de Dio, pura, naiva, kaj vivis feliĉe en Paradizo. Sed, pro la origina peko, la homoj estis forpelitaj de la paradizo, kaj estis malbenitaj ; tio signifas : unuaflanke ili estas kulpaj, duaflanke ili nepre devas labori por vivteni. Poste Kristo venis, kiu per sia martiro « savis la homojn, kiuj kredos lian parolon ». Tiam, la situacio estas tre klara : la infanoj naskiĝis markitaj de la origina peko, ili estas denaske kulpaj, kaj la ununura vojo al la savo estas : sekvi la instruon de la klerikaro : « estas neniu savo, for de la sankta eklezio ».

Same kiel la praaj infanoj estis nekapabluoj, ĉar ili ne lernintis la ritojn, tiel la kristanaj infanoj, maigraŭ frua bapto, restas iuj nekompletaj homoj ĝis plena religia edukado.

La infano fariĝas reĝo.

Oni povas diri, ke la unua paŝo « moderna » fontas en la Reformacio, ligita kun la eltrovo de la presarto. Tiam oni opiniis, ke kristano devas ne lerni de la klerikaro, kies morala konduto estis tiam tre kritikebla, sed de la « sanktaj libroj » mem, tio estas per legado. Tial necesis instrui la legadon al infanoj... por la savo de la animoj. La infano restis neperfekta, sed tamen ĝi povis saviĝi per memlernado... tio estas komenco de liberiĝo.

Sed en la 18-a jarcento, la ideoj revolucie ŝanĝiĝis pere de la verkoj de Ruso' (Rousseau). Tiu ĉi, kontraŭe al la komuna opinio tiutempa, asertis, ke la infano, kiu estas natura kreitaĵo, estas, pro tio, pli « bona » aŭ « pura » ol la plenkreskulo, kiu lernis el la socio, kie svarmas la malvirtuloj. Tiam la infano estas valora estaĵo, kiun oni devas eduki « nature », por ke ĝi konservu sian virtecon.

Alia paŝo en la sama direkto okazis en la 20-a jarcento, sub la influo de la Freud-posteuloj. Pro la fakto, ke iuj plenkreskuloj malsanas korpe pro iu psika kaŭzo, kiu daŭras ekde la infanaĝo, iuj konkludis, eble tro rapi-

de, ke ĉiufoje kiam infano ricevas de la socio iun suferon, tiam estas danĝero de psika malordo, kiu poste maskos malsanon. Sub tiu influo, la gepatroj unuflanke, la edukistoj aliflanke, timis malsanigi la infanojn per admonoj, ripročoj, kaj kompreneble punoj.

Mankis tiam, por kompletigi la reĝan kronon de la infano nur la ekonomiaj kondiĉoj ; kaj tio okazis en la mezo de la 20-a jarcento, en Usono kaj Eŭropo. Tiam kaj tie, la industrio produktis amase, dank'al maŝinoj, necesis vendi por repagi la maŝinojn, kaj tiu neceso puŝis la produktantojn al amasa reklamado. La profesiaj reklamistoj provas sugesti al la homoj aĉeti ĉion, aĉeti ĉiam, aĉeti ĉiel. La merkataj studoj montris la gravan rolon de la infanoj en la familiaj aĉetoj, tial la reklamistoj provis instigi al aĉeto por la infanoj, fare de la infanoj, pro instigo subtile prezentita de la infanoj. La deziroj de la infanoj iĝas senlimaj, la gepatroj estas relative riĉaj, kaj ĉefe, ili ne kuraĝas rifuzi ion al infano por ne frustri ĝin kaj okazigi psikan malsanon. Tial kaj tiel, la infano de la riĉa mondo, meze de la 20-a jarcento havas la povon de reĝo.

Kio estas la infaneco, kiu karakterizas la infanaron ?

La kliŝo de la jaro por la infanoj.

La Eŭropaj popoloj kutimas ligi la diversajn kampanjojn « por la infanoj », al bildoj, kiuj prezentas mizerajn infanojn en la landoj malriĉaj, kie la infanoj estas tiel, kiel ili estis en la malriĉaj popoloj, ĉu en primitivaj socioj, ĉu en evoluiĝantaj socioj, kiuj similas al tiu de la mezepoko Eŭropa. Kio plej impresas la rigardantojn de la nunaj bildoj, tio estas la kontrasto inter tiuj infanaj mizeruloj, kaj niaj reĝaj infanoj, kiujn mi ĵus priskribis. Inter tiuj ege malsimilaj situacioj, oni rajtas sin demandi ĉu la vorto : « infaneco » havas ununuran signifon.

Sed, eĉ en niaj riĉaj socioj estas mizeraj infanoj. Unuaflanke, ĉar eĉ en ĝenerale riĉa socio estas malriĉaj familioj, sed, duaflanke, ĉar eĉ en riĉaj familioj, infanoj povas esti mizeraj pro neglekto fare de la gepatroj, aŭ pro miskomprenoj psikaj sine de la familio. Tia mizero ne estas fotebla, la korpoj ŝajnas sanaj, sed la psika sano, malbona, kondukas, aŭ al forlaso de homa digno, aŭ al ribelo kontraŭ la socio : ŝteloj, murdoj, karcero. Ankaŭ tiaj infanoj bezonas nian helpon por esperi al homiĝo.

Kio estas infaneco ? La tradicia bildo kontraŭ la psikologia.

La infano difinita, kiel nekapablulon.

Tiu bildo kuŝas jam en la etimologio de la vorto : « kiu ne kapablas paroli », kaj estas apogita de la statuso de la infano en la socio, statuso, kiu respegulas la faktan nekapablon de la infano konduti tute same kiel homo plenkreska. La jam aludita teorio kristana plunutris tiun bildon : infano, tradicie, estas nekompleta plenkreskulo. Laŭ tiu bildo, pro tiuj mankoj, la socio devas « aldoni » edukon, edukon pripensitan de klera homo, laŭ la plej kleraj religiaj aŭ filozofiaj konceptoj... spite al la tiam nekonataj veraj bezonoj de la infano.

Intuicie, ekde la Renesanco, kaj poste dum la Reformacio, fine en la teorio de Ruso', oni provis liberigi la infanon de tiu « aldonita » eduko, sed nur la malkovroj de psikologio permesis montri, ke infano ne estas nekompleta homo, sed iu tute alia estaĵo, kiu ne fariĝas homo per sinsekvaj « aldonoj », sed per iom-post-ioma evoluo, kies etapoj naskas apartajn edukajn problemojn.

La etapoj de la evoluo.

Unue, ŝajnas al mi necese substreki, ke se laŭ ĝeneralaj trajtoj, la evoluo estas la sama por ĉiuj infanoj, tamen laŭ la rapideco, kaj ankaŭ laŭ la diversaj evoluvojoj, tiu evoluo estas speciala por ĉiu aparta infano. Tiu rimarko estas tre grava, ĉar, pro la scienca psikologia deveno de tiu evoluo, kaj aliflanke pro la bezonoj de la socio, oni tendencas konkludi, ke « ĉiuj infanoj estas egalaj » kaj konsekvence, ke oni povas ilin eduki amase, laŭ la samaj metodoj, kiuj nepre devas konduki al la samaj akiroj en la sama aĝo. Tiu simplisma konkludo endanĝerigas grave la tutan organizon de la edukado, sed tio, kvankam tre grava, tamen ne estas la temo de tiu pripensado.

En la unua etapo de la evoluo, la infano, kiu tiam vere similas al la etimologia bildo, povas nur ricevi. Korpe, ĝi estas senpova, ĝi nur nutras sin, psike, la infano iom post iom konscias pri sia propra ekzistado disde la cetera mondo. Tiam grave rolas la « patrino » kaj la « patro », la « patrino » nutras kaj alportas komforton, inkluzive de karesoj, kiuj estas gravaj, la « patro » sekurigas la « hejmon ». Kompreneble ne necesas la veraj gepatroj, ne necesas familio ; oni povas imagi, ke, en orfejo iu vartistino rolas la patrinon, kaj iu administranto rolas la patron, sed en tia situacio, reale, ĉiu infano disponas nur pri ono de patrino kaj tute malgranda ero de patro... kiu ajn estu la sindonemo de la deĵorantoj.

En la dua etapo, la infano kapablas agi, ĝi sukcesas iri de loko al loko, ĝi provas pli malpli sukcese modifi la mondon (translokigo de objektoj), kaj fine ĝi kapablas rilati kun la familianoj per akiro de lingvo. Tiu dua periodo, kiu transirigas la infanon de egocentrismo al ensociiĝo, estas kutime la periodo lerneja, en la landoj kie ekzistas lernejoj. La ĉefaj trajtoj de tiu periodo estas la malkovro de la « aliaj », la nebulaj bildoj de patrino kaj patro precizigas, kaj, krome, la infano renkontas kaj la gefratojn, kaj la najbarojn, kaj iom post iom lernas la regulojn pri la rilatoj kun tiuj « novaj » personoj. La dua periodo de la infaneco estas tiu de la akiro de kutimoj, kaj lernado de « reguloj ». Tio okazas tra la ludoj, tiuj ludoj necesaj, ekzerciĝo preparanta al la estontaj laboroj, kaj ankaŭ al la sento pri respondeco, kaj rilate al la aĵoj, kaj ankaŭ rilate al la « aliaj » personoj ĵus eltrovitaj.

En tria etapo, la infano komencas rilati kun la maturaj homoj, ĝi povas eniri en iun profesian vivon meze de socio, sed la problemo estas : kiu socio ?

La problemoj kiuj akompanas la evoluon de la infanoj.

Ĉar tiu prelego antaŭas diskuton, mi prezentos problemojn por nutri tiun diskuton, unuflanke ĉar ni povas diskuti nur surbaze de demandoj, aliflanke, ĉar mi scias, ke, pri tiuj problemoj, la opinioj estas tre diversaj, kaj, laŭ mia kono, neniun sciencan solvon diskuteblan oni ĝis nun trovis por tiuj problemoj.

Por la unua periodo, la kondutoj de la prizorgantoj, eventuale gepatroj, povas esti, detale, multe diversaj. Sed, se oni deziras trovi bazon por diskuti, oni povas ordigi la kondutojn laŭ du kontraŭaj tezoj. Laŭ la unua tezo, optimisma, la prizorgantoj principe fidas pri la « naturo », kaj deziras, ke la infano estu kiel eble plej libera. La tukoj ĉirkaŭ la korpo estu minimumaj, kaj oni tute ne provas trudi iun ajn kutimon, atendante, ke la instinkto, kaj la evoluo de la nervoj, « nature » perfektigu la funkcion de la sfinkteroj. Laŭ la dua tezo, pesimisma, la ĉefa zorgo de la gepatroj estas protekti tiun etan homidon, kaj por plifirmigi tiun protekton, oni eventuale limigas la liberecon de la infano. Ne parolante pri la eks-

modaj striktaj vindotukoj, tamen ekzistas multaj protektiloj, kiuj pli malpli ĝenas la liberecon de la infano. Sed la plej grava problemo estas la trudo de kutimoj, juĝataj bonaj, fare de la plenkreskuloj, kuracistoj kaj aliaj, sed kiujn la infanoj pli malpli bone akceptas. Al mi ŝajnas, ke la solvoj estas trovindaj laŭ la tujaj kondiĉoj, ĉar, se iuj infanoj tre facile akceptas alkutimiĝi pri io, aliaj infanoj (prave aŭ malprave, kiu scias ?) forte kaj konstante ribelas kontraŭ la sama io. Mi opinias, ke, en tiu frua epoko de la vivo, la prudento konsilas agi sen aprioraj teorioj. Jam en tiu periodo, la infano devas esti nek sklavo nek reĝo, la prizorgantoj devas esti tre adaptiĝemaj, ĝuste tiam, ĉar la adaptiĝo de la infano estas limigita.

Mi jam diris, ke la dua periodo estas signita de la ludoj kaj la reguloj. Sed denove estas diskut-areno por du problemoj. Unue, kiel elektiĝu la ludoj ? La unua tezo postulas, ke la infanoj mem elektu ĉiujn siajn ludojn, laŭplaĉe, kun nura celo : plezuro. Denove, oni esperas, ke la « naturo », aŭ la « bona instinkto » de la infano kondukos ĝin al « bona » elekto. Kontraŭe, oni povas opinii, ke tiu « natura instinkto » ne estas taŭga por la preparado al socia vivo, kaj tiam, oni juĝas, ke al la libere elektitaj ludoj la plenkreskuloj devas aldoni kompletigajn ludojn, ankoraŭ agrablaj al la infanoj, sed tamen indaj por socia eduko. La dua problemo, pri tiu periodo, estas la fonto de la reguloj. Denove temas pri fido al la « naturo » ; iuj opinias, ke la infanoj devas mem eltrovi la taŭgajn kutimojn kaj regulojn necesajn al la socia vivo. Kaj tiel kreiĝas « infanaj socioj », kiuj funkcias pli malpli bone, celas la feliĉon de la infanoj ; sed la malfacilaĵoj aperas, kiam, vole nevole, la infanoj devas transiri de tiuj artefaritaj socioj (ofte tre forte apogitaj, precipe mone, de plenkreskuloj), al la ordinaraj socioj. Pro tio, aliaj opinias, ke la sperto de plenkreskulo nepre necesas por helpi la infanojn en iliaj unuaj paŝoj en socio, eĉ infana. Tiuj opinias, ke la infana vivo devas prepari la infanojn, ne al utopia socio, sed al la realaĵoj de la mondo, pere de informoj liveritaj de plenkreskuloj.

La tria periodo pliampleksigas tiun lastan problemon. Tiam, la infanoj, kvankam nekapablaj perlabori sian vivon, kaj pro tio mi nomas ilin infanoj, tamen estas kapablaj kompreni la funkciadon de la socio, la sciencajn informojn, la uzon de la lingvoj, la mensogojn de propagando. En la malriĉaj socioj, tiu tria periodo okazas kadre de iu profesio, jam elektita sub la premo de neceso. Nur en la riĉaj socioj kaj riĉaj klasoj, la junaj homoj restadas en lernejoj, kie ili povas sin prepari, pli libere, al vivo en socio, sed kiu socio ? La edukistoj jam proponis diversajn skemojn, kiujn mi klasigos en tri grupojn.

La homa socio, kiel imagas ĝin la demokratoj, kie la homoj devas agi « virte », laŭ la klarigoj de Montesquieu, tio signifas, ke ĉiu individuo pensas unue pri la socio, kaj nur poste pri si mem. Tia socio, vole nevole estas religia, ĝi baziĝas sur « kredo » : la homo estas bona, la socio estas fondita sur kontrakto inter liberaj homoj, kiuj deziras agi por la komuna bono. Oni kompreneble povas aldoni kroman religion por enŝovi tiun pure homan religion en pli vastan komprenon de la universo, kaj kutime oni uzas la vorton : « religio » nur por tiuj pli vastaj religioj, sed mi deziras substreki la fakton, ke, kiu ajn estu la elektita religio pri la « rolo de homo en universo » kaj « signifo kosma de la homa vivo », tamen rilate al pure sociaj problemoj, la « kredo » al bona homo, kaj paca kunlaborado inter la homoj, estas necesa por tiu koncepto de « homa » socio, kaj eventuale « homara » socio, same kiel ĝi aperas en la « homaranismo » de Zamenhof.

Al tiu modelo, oni povas opozicii per « reala » prezento de la socio, tia, kia ĝi estas antaŭ nia rigardo. Tiam oni povas emfazi pri naciismo, pri klasbatalo, socialismo kaj ĝiaj necesaj luktoj kontraŭ la burĝa socio. Denove, laŭ mi, tio estas religio, ĉar ĝi baziĝas sur « kredo » : la « valoro », la « vero », la « bono » k.t.p. kuŝas ĉu en pli altnivela nacio aŭ raso (tia estis la tezo de Hitler'), ĉu en la proletaro, kiu, laŭ la hipotezoj de Marks, kaptinte la politikan povon starigos senklasan socion, kie la homoj estos liberigitaj disde ĉia ŝtata povo. Oni rajtas kredi tion ; sed ĝis nun, tiu « miraklo » neniam kaj nenie okazis, kaj pro tio, oni rajtas ankaŭ « ne kredi ».

Restas, kio ŝajnas al mi la plej saĝa sinteno, nenion kredi, kaj juĝi nur laŭ la spertoj (ĉar en sociologio kaj en politiko la eksperimentoj ne eblas). Kaj, laŭ tiu filozofio, kiun oni povas taksi skeptikismo, la helpo al maturiĝanta infano estus skeme la jena :

— bona kono de si mem,

— bona kono de la scienca realaĵo (eĉ se ĝi estas proksimuma kaj provizora), kaj tio lasas lokon por fantazii kaj hipotezi religion, sed tiam « personan » religion oni neniam trudu al la aliaj.

— trejnado je kritiko, kaj de si mem, kaj de la kutimoj de la homaj grupoj. Tiu kritiko ŝajnas al mi la plej efika armilo, unuflanke kontraŭ persona orgojlo, aliflanke kontraŭ la « religioj » truditaj de la ĉirkaŭantaroj, religioj, kiuj, eventuale bonaj kaj justaj en si mem, tamen iĝas malbonaj pro la trudado, kiu, vole nevole, kondukas al subpremo, ribeloj, militoj k.t.p.

Mi provis rapide skizi la situacion de la infanoj en la diversaj socioj, ĉu tra la tempo, ĉu en la numtempo tra la diversaj, pli malpli riĉaj, socioj. Tiu situacio estas ege diversa, sed prudentas ne juĝi laŭ la supraĵa aspekto : povas kuŝi mizero en riĉeco. Ĉiukaze, la infanoj, kiuj ege diversas laŭ aĝoj kaj ankaŭ laŭ individuaj kapabloj, ĉiam bezonas la helpon de plenkreskuloj. Oni povas longe diskuti pri la formoj de tiu helpo, mi esperas, ke vi pripensos la proponitajn temojn, sed, ke ekde nun vi plene sentas la bezonojn de la infanaro, kaj konscias, ke, se 1979 estas « la jaro de la infanaro », nia helpemo al la infanoj necesis antaŭ tiu jaro kaj ankaŭ necesos longtempe post ĝi.

F. Boyet.

Majstro verko, bonega traduko

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de MAUPASSANT

tradukita de Roland Dupuis

Prezo : **36 francaj frankoj**

Rabato 30 % por tri ekzempleroj aŭ pli

GLACIAJ ERAOJ

Studoj pri la Tera Krusto konkludis, ke estas nur en raraj epokoj, ke la glacioj kovris vastajn surfacojn de la Tero, ne nur montojn, sed ankaŭ valojn kaj ebenaĵojn.

Oni konas tiujn de la primara erao (en Kambrio, Karbonio, Permio) antaŭ 600 Milionoj da jaroj ; la lasta pli speciale trafis la aŭstralan hemisferon.

Oni malpli bone konas tiujn de la eraoj sekundara kaj terciara, antaŭ 250 Milionoj da jaroj.

En la Kvartenara erao, kiu estas ankoraŭ la nia, komenciĝis (dum Plejstoceno, antaŭ 2 milionoj da jaroj) nova glacia erao. Estas proksimume en tiu momento, ke Homo aperas en Afriko ; estas la Homo Habilis, afrika, en stara pozicio, kapabla je prononcataj sonoj ; ĝia cerbo estas je 435-600 cm3, dum la Homo Sapiens, 10 000 jarojn antaŭ Kristo, havos cerbon je 1650 cm3.

Tiu glacia erao finiĝis nur 8000 jarojn ant. K.

En tiu longa periodo alternas varmaj kaj malvarmaj periodoj. Proksimume 10-foje glaciaj epokoj, kun tre malvarma klimato, alternas kun pli varmaj epokoj, kun pli dolĉa klimato. En Alpoj oni precizigis 5 glaciajn periodojn, nomitaj « donnau, gunz, mindel, riss, würm », laŭ la nomoj de Danubo kaj ĝiaj alfluantoj.

En malvarmega periodo, enormaj glaciaj kupoloj kovris grandan parton de la norda hemisfero (Kanado, Nord Usono, Islando, Skotlando, Pireneoj, kaj Centr-Eŭropo). El tiuj enormaj kupoloj elfluis grandaj glaciejoj, pli ol 600-km-longaj, kiuj invadis valojn kaj ebenajojn.

Nur la okcident-eŭropaj ebenaĵoj estis iom indulgitaj.

Tie ĉi instaliĝis la homoj.

Oni serĉis eksplikon al tiuj ripetitaj malvarmo-ofensivoj. La astronomoj konsideris la variadojn de la tera orbito ĉirkaŭ la suno. Tiuj variadoj okazigas kelkgradan plietigon de la temperaturo ; tio malvarmigas la akvon de la oceanoj, pli abundigas la neĝo-falojn sur la glaciejojn ; tiam, tiuj ĉi, kupolo-formaj dikiĝas (ĝis 3 000 m en Laponio). Tamen oni rimarkas, ke tiuj variadoj de la tera orbito estis okazintaj eĉ dum la varmaj periodoj antaŭaj al 2 milionoj da jaroj.

Oni ankaŭ parolis pri la suriĝado de la montoj en la Terciara kaj Kvaternara eraoj (Alpoj, Himalajo, Kordileroj). Sed la datoj ne koincidas. Plie oni rimarkis, ke Himalajo kaj Aziaj montoj ne havis glaciajn kupolojn, dum tiaj kupoloj ekzistis en Groenlando kaj Antarkto).

Oni pensis, ke la pulvoj forĵetitaj de la vulkanoj povis malhelpi la trairon de la sunradioj ; sed reale, tio ne sufiĉas por okazigi glaciadon.

La astronomoj proponas alian eksplikon, pli valoran :

— aŭ la varmo radiita de la suno, de tempo al tempo, malpliiĝis ;

— aŭ la Tero trairis nubojn de kosmaj pulvoj ; tiaj nuboj estas multnombraj en la Universo.

Do, antaŭ 20 milionoj da jaroj, la klimato de nia Tero freŝiĝis ; tion montras al ni la restaĵoj de la retrovitaj plantoj kaj la procentoj de la diversaj oksigenaj izotopoj.

En la komenco la freŝiĝo estis modesta kaj sen granda konsekvenco. Sed momento venis, antaŭ 2-3 milionoj da jaroj, kiam la temperaturo estis tiel malalta, ke la grandaj glaĉeroj komencis kupoliĝi. Samtempe ekis la oscilada procezo : malvarmo — varmo, KTP.

La lasta malvarmo-ondo komenciĝis ĉirkaŭ — 70 000 ; ĝi konis remito-periodojn : ĉirkaŭ 27 000, 24 000, 11 000, 9 000 ; Ĉirkaŭ 8 000 la glacia ondo estas finiĝinta. Hodiaŭ ni vivas en periodo interglacia. Bruska malvarmiĝo de la klimato povus okazigi novan alvenon de la glacioj.

Tiuj enormaj masoj da glacio malgrandigis la akvokvanton en la oceanoj ; je la plej forta glaciado, la akvonivelo estis 140 metrojn pli malsupre ol hodiaŭ ; antaŭ 35 000 jaroj ĝi estis nur 90 m pli malsupre. Intermite ĝi daŭre supren-leviĝis dum la lastaj 18 000 jaroj.

La konsekvencoj estis eksterordinaraj : Maniko estis elmergita ; ankaŭ la Manika Markolo, kie kelkfoje fluis riverego (hodiaŭ ĝi estas nur 50 m — profunda). Oni povis piede iri de Francujo al Britujo kaj Irlando. Sejno ĵetiĝis en la oceanon, ie, norde de Bretonio. Mozo, Rejno, Odero, norde renkontis la barieron de la glaĉeroj ; ili demetis siajn rokojn, ŝtonojn, sablojn, norde de Belgujo, laŭsekvis la Manikan Markolon kaj trafis Sejnon kaj Manikon. La bordoj de Atlantiko estis 60 km pli malproksime ol hodiaŭ ; Jersejo, Bel-Insulo, Noirmoutier, Oleron, ne estis insuloj. En Mediteraneo, la duono de la hodiaŭa Leono-Golfo estis tero.

Francujo estis pli granda je sia hodiaŭa kvinono.

Dume la enorma pezo de tiu glacio estis enprofundiginta la terojn, kiuj lante realtiĝis post la degelado (de unu ĝis naŭ centimetroj laŭ la regionoj). Post sia malapero, la glaciejoj postlasis fjordojn, valojn, lagojn, basenojn.

La alternoj de frosto kaj degelado transformis la grundon ; dum malrigora vetero la glacimontoj deŝiriĝis de la glaciejoj ; la maro frostita, kelkfoje laŭ unu metra dikeco, liberigis bankizojn, kiuj kapablis transporti ŝtonblokojn 2m-longajn kaj pezajn je pluraj tunoj. La akvo, kiu infiltriĝis kaj frostis, displitis la rokojn en ŝtonojn, ŝtonetojn, en ŝlimojn ; ĝi solvis la kalkŝtonon, la silicon, la nigran mangano-oksidon, la fer-oksidon rustkoloran, kiujn ĝi transportis iom pli malproksimen ; ĝi larĝigis la fendojn, kreis la sub-rokajn ŝirmejojn, kaj pli profunde la grotojn kaj la kavernojn. La neĝo-fando okazigis enormajn akvo-fluojn, kiuj transportis ŝton-blokojn ; sur la frostita sub-grundo, la riveroj estis multaj ; post la degelado, tiuj riveroj rariĝis kaj lasis marĉejojn kaj torfejojn ; la homoj estis devigataj translokiĝi kaj instaliĝi rande de la grandaj riveroj.

Dum la unuaj glaciadoj, kontraŭ tiuj klimataj transformoj, la homaj rasoj ŝajne ne sciis reagi per teknikaj iniciatoj. Ili elportis la saman sorton, kiel plantoj kaj bestoj : Morto aŭ Migrado norden aŭ suden.

Ne same okazis dum la lastaj glaciadoj : la homoj uzis fajron, vestojn, grotojn.

Ĉirkaŭ 11.000- 9.000 la klimato varmiĝis : la glaciejoj liberigis Danlandon (ĉirkaŭ 15.000), Svedion (ĉirkaŭ 12.000), pli supre (ĉirkaŭ 8.000), Maniko kaj Norda Maro kuniĝis. La subgrundo degelis ; la marĉoj sekiĝis ; la pejzaĝoj ŝanĝiĝis : pli kaj pli la tundro malantaŭeniris norden. Kaj la arbaro pli kaj pli triumfis. La polenoj, konservitaj en la stratumoj de la grundo, bone bildigas tiun post-glacian rekonkeron : la muskoj, la likenoj, kiuj postvivis kaj

la algoj putris kaj riĉigis la grundon por pli postulemaj plantoj ; kaj, dank'al suda vento, estis invado de betuloj kaj salikoj ; tiuj arboj rapide kreskas kaj potence reproduktiĝas kaj disĵetas siajn semojn. Poste, dum 6.000 jaroj, regis la pinoj, kies kreskado estas pli lanta. Fine, de 3.000 jaroj, estis la piceoj, kiuj instaliĝis, devenante el la Granda Orienta Tajgo.

Dum miloj da jaroj, la homo estas, antaŭ ĉio, ĉasisto. Estas precipe la mamuloj, kiuj lin nutras.

Buffon skribis, ke « La Homo malembarasis la Teron, je tiuj gigantaj bestoj, kies enormajn skeletojn ni ankoraŭ trovas ». Reale, la grandaj dinosaŭroj priloĝis la Teron dum la sekundara erao. Ili malperis 100 milionojn da jaroj antaŭ la apero de Homo sur la Tero.

La antaŭenado kaj malantaŭenado de la glaciejoj influis la vivon de la sovaĝbestoj. Dum la grandaj malvarmoj, kelkaj migris suden, aliaj adaptiĝis al la rigora klimato ; sed ili reiris norden, kiam revarmiĝis.

Ĉirkaŭ 35.000 jaroj antaŭ Kristo, kvankam la sekeco malantaŭenigis la glaciejojn, denove tre malvarmiĝis. Estis en la Eŭropaj ebenaĵoj, precipe en okcidenta Francujo, la tempo de la mamuto, de la boaco, de la urso. El nordo alvenis la moska bovo, la blua vulpo, la gulo, la lemo, la otuso de la neĝoj, la antilopo saïga, la gerbilo. El la montoj malsupreniris la ĉamo, la sovaĝa kapro, la marmoto. La bizono, la uro, la noskulo, kiuj loĝis en Pireneoj, estas hodiaŭ en ĉirkaŭ-polusa regiono.

Estis la tempo de la boaco ; jam de longa tempo ĝi ĉeestis en Eŭropo (jam en ĉirkaŭ — 50 000) ĝi plej abundas en magdalenia periodo (-18.000) ; ĝiaj ostoj, hufoj, kornaroj tre utilas al la homoj ; ĝi tre abundas sur la muroj de la grotoj. (Combarelle, Fond de Gaume). Kaj ĉirkaŭ -8.000, -7.000, la varmiĝo repuŝas ĝin norden.

Samperiode ankaŭ ĉeestis cervo kaj alko. Cezaro notis ties ankoraŭan ĉeeston en Eŭropo.

Jam de longe, ĉevaloj galopis en la stepo kaj la tundro ; ili daŭrigas sian galopon sur la muroj de Lascaut ; la ĉasistoj ilin postkuris ĝis la klifo de Solutre, kie la bestoj malsupren falis kaj havigis nutraĵon al la homoj.

Gigantaj bestoj figuras sur la grotaj muroj : la mamuto kaj la lana rinocero ; ambaŭ malaperis ĉe la fino de la lasta glaciado.

La manuto estas samtempa kun la unuaj homoj ; ĝi estis kovrita je dika felo, kies lano mezuris 20-30 cm ; ĝi okupis la tutan Nordazion ; tra la Behring-pasejo ĝi pasis en Nordamerikon ; ĝi instaliĝis en la tuta Eŭropo, ĝis Hispanujo ; ĝi estas belege pentrita en multaj grotoj. La Beruwa-kuŝejo (Moravio) liveris (apud 40.000 ilojn el siliko, el boaca kornaro kaj osto, el eburo) plurajn milojn da ostoj el ĉirkaŭ 500 mamutoj. En la glacioj kaj en la glaciigitaj teroj de Siberio, kaj ankaŭ en la valoj de Orb, Ienisei kaj Lena, oni trovis tutajn kadavrojn de mamutoj kun karno kaj felo, kaj perfekte konservitajn. De la 18-a jarcento (post Kristo) oni ekspluatis la fosilian eburon de la mamuto-kornoj (ekspluatado, kiu ĉesas hodiaŭ).

La ĉasistoj postkuris la mamutojn direkte al diversaj kaptiloj, al fosaĵoj kaŝitaj sub brancoj, al marĉoj, en kiujn la bestoj enŝlimiĝis. La lana rinocero estis pli danĝera ; ĝi estas malmulte reprezentita en la grotoj, sed ĉiam kun ĝia abunda felo ; oni trovis pentraĵojn pri ĝi ĝis en Italujo ; sed, en Siberio kaj Galiciaj minejoj, oni trovis tutajn rinocerajn skeletojn.

Sur la ĉas-terenoj, eĉ en siaj grotoj, la homoj renkontis danĝerajn konkurantojn. La Granda Kato de la kavernoj, granda kiel leono, estis kruela ; la Urso de la kavernoj lasis multajn ostarojn ; pentraĵoj, statuetoj, tomboj pri ĝi, ŝajne estis ritaj. La hieno de la kavernoj adaptiĝis al ĉiuj klimatoj. Fine, la lupoj, la vulpoj jam de tre longtempe vizitis nian Teron. Iloj, pentraĵoj montras birdojn, reptiliojn, fiŝojn.

Inter la unua Afrika Homo Habilis kaj la Homo de la kavernoj estas milionoj da jaroj.

Piede de Himalajo kaj en Afriko la terciaraj terenoj liveris dentojn kaj fragmentojn de mandibloj, kiujn oni atribuas al homaj estaĵoj. Iom pli poste, en Afriko, ŝajnas, ke tiuj Homoidoj forlasis la arbaron por la savano. Estas la Homo Habilis Afrika. Iliaj posteuloj, kiuj vivis komence de kvaternaro, dank'al pli abundaj restaĵoj, estas pli bone konataj.

20 milionoj da jaroj por fari Homon :

Post la esploradoj de Darwin kaj de Thomas Huxley, oni akceptis la ideon pri Evoluado. Hodiaŭ, cent jarojn pli poste, la esploroj pri anatomio kaj pri molekula strukturo de la proteinoj, konfirmas tiun teorion.

Antaŭ 20 milionoj da jaroj, la Primatoj naskis tri speciojn : la Lemuredoj, la Grandaj Simioj, la Homa Estaĵo. Tiuj specioj, laŭlonge de la jarmiloj, evoluis kaj pli kaj pli iĝis malsamaj. Fragmentoj de skeletoj, fosiliaj kranioj malkovritaj en Hindujo, Javo, Ĉinio, ebligas starigi siluetojn de tiuj Homoidoj. Apud tiuj ostoj, oni kelkfoje trovis hakitajn ŝtonojn. La datado per karbono-14 lokas la plej antikvajn el tiuj skeletoj fine de terciaro.

La posteuloj de tiuj Homoidoj evoluis ; ili du-piediris ; cerbo grandiĝis. Laŭ kelkaj scienculoj, la aktuala Homo Sapiens (ni mem) devenas de unu nura praulo. Laŭ aliaj, diversaj homoidaj specioj kondukis al la nuna homaro.

Jen kelkaj el tiuj specioj :

La Homo Habilis en Afriko, en Javo, en Eŭropo, en Palestinio. Ankaŭ fine de terciaro aperis la Ramapitekoj (en Hindujo) ; ili ankoraŭ vivis sur la arboj. (3 M da jaroj)

Samtempaj kun la unuaj kvaternaraj glaciadoj (3 M da jaroj) la **Aŭstralopitekoj,** du-piedirantoj ; iliaj fosilioj estas multaj ; ili estas pli bone konataj ; ili forlasis la arbojn ; la formo de ilia gorĝo ebligas al ili prononcatajn sonojn, unuan lingvaĵon ; ili komencis haki ŝtonojn ; ili vivis en Afriko kaj Eŭropo ; estis jam la komenco de Paleolitiko.

La Pitekantropoj (I M da jaroj ĝis 400.000 jaroj) vivis en Javo, Ĉinio, Eŭropo, Afriko. Ili loĝis en grotoj, kie ili faris fajron (dum la Mindel-glaciado) ; ili hakis bifacilojn ; ili estis pli bone armitaj kontraŭ la bestoj.

La Neandertaluloj (de 400.000 ĝis 50.000 jaroj, en la Meza Paleolitiko) vivis en Francujo, Germanujo, Anglujo. Iliaj iloj estas tre diversaj (rastiloj, pintoj, tranĉiloj, boriloj, fajriloj. Ili okupis la enirejon de la grotoj kaj la subrokajn ŝirmejojn. Jam ekzistis diversajn rasojn kun malalta frunto, elstaraj orbitoj, peza vizaĝo. Ili kolektis fosiliajn konkojn, pirit-blokojn, kristalojn de kvarco aŭ galeno kaj ostajn disketojn kiel ornamaĵojn aŭ kult-objektojn. Ili uzis okron.

Kaj Homo Sapiens triumfis dank'al sia inteligenteco.

Noto : Hodiaŭ kelkaj scienculoj ne akceptas tiun teorion pri Evoluado. Kelkaj elvokas tiujn Gigantojn, pri kiuj parolas la Biblio. Konsekvence, nia homaro estus regresanta.

Mihai EMINESCU



(15 jan. 1850 - 15 jun. 1889)
rumana nacia poeto
[mihaj' eminesku]

Romantika. Studoj en Vieno kaj Berlino. Nelonge, direktoro de la Centra Biblioteko en Iasi [Jaŝ], lerneja revizoro, poste — redaktoro de la ĵurnalo « Timpul » (« La Tempo ») en Bukureŝto. Partoprenis la literaturan rondon « Junimea » (« La Junularo »). Antaŭ lia morto aperis unika volumo, « Poezii » (« Poeziaĵoj » - 1883) ; poste oni aperigis ankaŭ liajn postmortajn poeziaĵojn (la plej enhava estas la eldono far la kritikisto Perpessicius, 7 volumoj ĝis nun aperintaj).

Pasia temperamento, soleca kaj meditema, pasante de eŭforiaj statoj al la melankolio, tragedie travivis. Romantika vizia spirito, imagante kosmokreadojn (« Unua Letero »), allogita de la mirindaĵo de l' tratempa vojaĝo, observante mitologiojn kaj forpasintajn civilizaciojn (« Memento mori », « Odin' kaj la poeto ») aŭ vagante tra l' stelaraj spacoj (« La fabelo de la mago stelojn vojaĝinta »), li estas la kreinto de demoneca heroo, skeptika komentanto de l' historio kaj de la individua ekzistado, riĉiĝinta je la atributoj de titana ribelulo (« Anĝelo kaj demono », « Imperiestro kaj proleto », « Demonismo »). Super ĉio priluna kaj priĉiela, lia liriko, per kortuŝantaj muzikeco kaj harmonio, miksigas folkloreske la vokon de la amo, volupte dolora, kun tiu de la paradizeska naturo (« Calin - folioj de fabelo », « Sopiro », « La fabelo de l' tilio », « Vespere sur monteto »). Poeto de l' homa kondiĉo kaj de l' patrolanda entuziasmo (« Tria Letero »), li kulturis samgrade la medit-pesimisman lirikon kun ŝopenhaŭeraj reehoj (« Glosso », « La preĝo de daco »), kontraŭstariginte la solecan kaj eternan genion al rapide forpasanta homaro (« La Vesperstelo » - lia ĉefverko). Filozofia kaj lirik-fantazia prozo, organike parenca al lia poezio (« Kompatinda Dioniso », « Vakua genio », « Ĉezara », « La avataroj de l' faraono Tlà »), popoleskaj fabeloj kun poezia stiligado (« Bel-Infano el la larmo »). Valora ĵurnalista agado, vastaj dramaturgiaj projektoj, folklorkolektoj.

Laŭ « Mic dictionar enciclopedic » (« Malgranda enciklopedia vortaro »), Editura enciclopedica româna, Bucuresti, 1972, p. 1218.

SUPER SUPROJ

Super suproj — lun' radia,
Dolĉe flustras la branĉar' ;
Kaj resonas tra l' arbar'
Korna vok', melankolia.

Ĉiam for, kaj plie for,
Pli mallaŭte, mallaŭtete,
Koro, vin senkaresete
Dolĉigante per dolor'.

Kial ĉesi, rave kiam
Mi al vi turnas la koron ?
Ĉu plu sonos, dolĉa korno,
Vi por mi denove iam ?

AL STELO

Al stel' ekleviĝanta nun
Longega vojo kuŝas,
Ke post jarmiloj ĝia lum'
Rigardon teran tuŝas.
De longe — eble — tra la blu'
Ĝi mortis en lontano,
Kaj nur radi' apenaŭ plu
Sin montras al terano.

La bild' de l' eksa stelo tra
Ĉielo glite palas,
Ĝi — nevidate — estis ja,
Kaj nun — vidite — malas.

Samtiel, nia amsopir'
En nokton pereinte,
Radio de l' estintdezir'
La koron sekvas — pinte.

FORFLUGIS JAROJ...

Forflugis jaroj — nube — trans ebenoj
Kaj ili plu revenos, ve ! neniam,
Ĉar min ne plue ravas, kiel iam,
Fabeloj, dojnoj, kredoj kaj divenoj

Sencplenaj, sed apenaŭ per komprenoj
Serenigintaj knaban frunton tiam,
Et-aĝe ; nun tardhoro, vanas kiam
Vi min ligprovas per krepuskfadenoj.

Eltiri nur etsonon el pasinto,
Animo mia, ree vin vibrigu,
Mi vane manon sur la lir' ŝancelas ;

Perdita estas ĉio en estinto,
Orbuŝ' iama kuŝas en mutigo,
Post mi la tempo kreskas... mi malhelas !

NUN, DORMEMAJ, LA BIRDETOJ

Nun, dormemaj, la birdetoj
Rekunvenas nestan rondon
Kaj sin kaŝas sub branĉetoj.
Bonan nokton !

Plu flustretas l'akvo fonta,
Dum — silente — sur arbaron,
Florojn, estas tuj falonta
Dorm' sen baro.

Al kannest', sur akvaj steloj,
Glitas cigno, blanka formo ;
Estu apud vi l'anĝeloj,
Dolĉan dormon !

Super nokton laŭfabelan
Lun' altigas luman fonton,
Ĉion regas revo bela.
Bonan nokton !

DA CENTOPAJ ŝIPAJ MASTOJ

Da centopaj ŝipaj mastoj
Forlasintaj bordsignalojn,
Kiom rompos tra la vastoj
La marventoj, la ondfaloj ?

Da birdetoj elflugontaj
Are sub ĉieltegmentoj,
Kiom mortos endronontaj
Pro l'ondfaloj, pro l'marventoj ?

Se postkuros vi l' bonŝancon
Aŭ la altajn idealojn,
Ĉien sekvos vin la danco
De l'marventoj, de l'ondfaloj.

Senkomprenaj restas penso
Poemita, viaj sentoj,
Ĉiam bruas ilin denso
De ondfaloj, de marventoj.

KAJ SE...

Se vitron frapas la branĉar'
Kaj poplojn skuas vento,
Je tio signas je l' refar' —
Pri vi — de mia sento.

Kaj se penetras stela bril'
Profundon de l' lag' fora,
Je tio signas je l' trankvil'
De mia pens' dolora.

Kaj se la nuboj glitas for
Por resti lun' radia,
Ja tio signas je l' memor'
Eterna pri am' via.

Esperantigitaj de
C. Dominte

Bibliografia Skizo pri la Poeziaĵoj de Eminescu Tradukitaj Esperanten

(r. = represita)

1. LA DORMEMA BIRDETARO, trad. G. Robin, « Danubo », n-ro 2, 1910, p. 42,
   r. « Noua revistà românà », IX (1910), n-ro 5, p. 106-107,
   r. « Esperanto » (Ploiesti-Rumanoi), III, n-ro 1, aŭgusto 1927, p. 1,
   r. « Internacia Kulturo », n-ro 2, 1945, p.
2. ARBARA BRUETADO, trad. Julio Hecht, « La homo », I, n-ro 1, sept. 1930, p. 1 ;
3. LA STELO, trad. Kálmán Kalocsay, « Eterna bukedo », Kalocsay, « Eterna bukedo », 1931, p. 243 ;
   r. « Paco » (hungara eldono), n-ro 133, dec. 1964 ; 244,
4. SOPIRO, trad. Kalocsay, « Eterna bukedo », 1931, p.
   r. « Paco » (hungara eldono), n-ro 133, dec. 1964 ;
   r. « Hungara Vivo », n-ro 4, 1964, p. 29 ;
5. NOKTO, trad. Kalocsay, « Eterna bukedo », p. 245 ;
6. SOLA SOPIR' DE L' SIN' trad. Kalocsay, « Eterna bukedo », p. 246-247 ;
7. ĜIS LA STELO, trad. P. Firu, « Informa bulteno de R.E.S. », n-ro 3, 1946, p. 2,
   r. « Internacia Kulturo », n-ro 3-4, 1950, p. 11 ;
8. VENUSO KAJ MADONO, trad. P. Firu, « Internacia Kulturo », n-ro 6-7, 1947, p. 6 ;
9. ADIAŬ, trad. P. Firu, « Internacia Kulturo », n-ro 9, 1947, p. 8 ;
10. SONETO, trad. P. Firu, « Internacia Kulturo », n-ro 9, 1947, p. 10 ;
11. ESTANTE FOR DE VI, trad. Armand Ŝu, « La Espero », n-ro 11-12, nov.-dec. 1964, p. 108 ;
12. HO, PANJO, trad. A Boldan, « Bulgara Esperantisto », n-ro 2, 1967, p. 4,
    r. « La Espero », n-ro 910, sept.-okt. 1968, p. 68 ;
13. INTER BIRDOJ, trad. N. V. Bulenca « Limba esperanto Studiu analitic », Bucuresti, 1974, p. 149 ;
14. POST TIEL LONGA TEMPO, trad. N. V. Bulencea, samloke ;
15. PRETER LA POPLOJ SEN KOMPAR', trad. Jozefo Petrin, « Kulturaj kajeroj », n-ro I, jan.-febr. 1977, p. 11 ;
16. AL STELO..., trad. Constantin Dominte, en la sekcio **Tekstoj. El la rumana literaturo,** ene de la multobligita universitata lernolibro : Prof. dr. Ignat Florian Bociort, « Lucrâri pratice de esperanto-interlingvisticâ », Timisoara (Rumanio), 1979, p. 160.

Constantin Dominte.

POR VIA DISTRO

Solvoj de la antaŭaj problemoj

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	M	E	D	A	L	I	O	N	O	J
2	U	T	E	R	O	■	P	I	K	E
3	L	E	P	O	R	O	■	K	■	N
4	T	R	O	■	D	R	E	S	I	■
5	I	O	N	I	O	■	S	O	N	O
6	P	■	I	D	■	E	T	■	T	E
7	L	E	T	A	L	■	R	E	I	R
8	I	L	A	R	■	L	A	R	M	■
9	K	A	J	O	L	A	D	O	■	I
10	I	N	■	J	A	R	O	■	B	O

ENIGMO


Por trovi la solvon de la enigmo pri la vivo de Zamenhof, oni devis fari la jenajn operaciojn :

1) 1859 × 12 = 22308
2) 22308 + 1917 = 24225
3) $\frac{24225}{15} = 1615$
4) 1615 × 14 = 22610
5) 22610 + 1887 = 24497
6) 24497 × 4 = 97988
7) 97988 — 1905 = 96083
8) 96083 × 3 = 288.249
9) 288249 — 44 = 288205
10) $\frac{288205}{5} = 57641$
11) 57641 — 1 = 57640
12) $\frac{57640}{2} = 28820$
13) 28820 — 4 = 28816
14) $\frac{28816}{16} = 1801$
15) 1801 + 5 = 1806
16) $\frac{1806}{2} = 903$
17) 903 + 57 = 960
18) 960 + 41 = 1.001

★

Nova problemo

Krucvortoj :



Horizontale :

1 — Unu post la alia.
2 — Malgranda kava loko.
3 — Ĝi faciligas la movadon (R) ; Eluzi (R).
4 — Sufikso ; Por gvidi la rajdbeston.
5 — Matadoro (R).
6 — Prepozicio aŭ prefikso ; El altapreza metalo.
7 — Kaŭĉuko ; Tie haltadas la ŝipoj (R).
8 — Nedifinita pronomo ; Irejo.

Vertikale :

1 — Grava vojo.
2 — Moviĝado ; Numeralo (R).
3 — Senvestiĝinta (R) ; Movi boaton.
4 — Konjunkcio ; Ĝi ĉiam akompanu la bonon !
5 — Tre malpeza, supertera.
6 — Galerio.
7 — Aromoj.
8 — Utopia lando.

(R) = nur radiko.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

I

Por esprimi la tempon, dum kiu la ago finiĝas.

ONI UZAS LA PREPOZICIOJN : ĜIS, ANTAŬ :

ĜIS : ĝis nun, ĝis tiam, ĝis la revido.

— li laboradis ĝis profunda nokto.

— li ĵus foriris, li restadis kun mi ĝis nun.

ANTAŬ : ANTAŬ OL

— oni devos pagi antaŭ la fino de la monato.

OL precizigas, ke temas pri tempo, momento.

— atendu min, se vi venas antaŭ ol mi.

Ni komparu :

— vi cedos antaŭ mi (antaŭ mia forto).

— vi cedos antaŭ ol mi (pli frue ol mi).

II

POR ESPRIMI LIMTEMPON ĜIS KAJ ANTAŬ NE ESTAS TUTE SAMSENSAJ :

— mi sendos la respondon ĝis dimanĉo (plej malfrue en dimanĉo)
antaŭ dimanĉo
(plej malfrue en sabato).



Sukcesa kreado :

— Vidu kiel plej sukcese ni starigis kompatigan homon !

— Laŭ ci, kiom da personoj, ĝis vespero, montriĝos kompatemaj ?

— Eble, ili nur opinios, ke « ĉiu laboro meritas salajron !

III

POR ESPRIMI DAŬRON SEN LIMTEMPO ONI UZAS : Por ĉiam, Por eterne :

— desegni tion en la libro, por ke tio restu por la estonta tempo, por ĉiam, por eterne.



Prišparemaj devigoj :

Prenu por vi mem miajn pantoflojn ; ili estas longaj kaj larĝaj kaj ne dolorigos viajn piedojn ; ĉar mi ne plu povas skiadi, mi volas eluzi tiujn skiojn, ĝis ili rompiĝu. Trankviliĝu, mi trančos iliajn ekstremaĵojn.





Kalkulema Naturo :

— Ĉu vi sciigis la patron pri la tri naskiĝoj ?

— Jes, sed li pensas, ke mi eraris. Li resendis min ĉi tien dirante : Ne revenu antaŭ ol vi estu pli bone kalkulinta

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (280 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2 400 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1979, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte rendu de la dernière réunion du Conseil d'administration, que vous trouverez dans ce numéro, montre que la situation de la M.C.E. n'est pas mauvaise, même si elle n'est pas aussi bonne que nous l'avions espéré. Nous pourrons, cette année encore, faire un certain nombre d'aménagements. Ils seront volontairement réduits à l'essentiel afin que la somme ainsi réservée puisse être ajoutée aux excédents de recettes de l'an prochain et l'ensemble affecté à des travaux urgents, mais très coûteux, la réfection complète des couloirs du deuxième étage. Il nous faudra ensuite nous attaquer au rez-de-chaussée et aussi poursuivre l'aménagement dans les communs des salles de cours et des ateliers. Programme réalisable à moyen terme si la M.C.E. continue à « tourner » comme elle le fait.

Le programme des activités de 1980 se met au point. Cette année, le calendrier des stages était à la disposition des intéressés dès le 15 novembre. Les demandes de renseignements arrivent au rythme habituel. Mais il est à craindre que la situation internationale actuelle n'incite guère les gens à s'engager rapidement. Espérons que les nouvelles dispositions concernant les vacances scolaires ne bouleverseront pas trop le rythme des arrivées et des départs.

Les conférences du premier stage promettent d'être intéressantes. Parmi les sujets traités, il y aura l'Islam, la naissance de l'art, propres à la discussion et à la réflexion. Pour la deuxième période, le schéma des trois niveaux d'étude de la langue est respecté : cours pour débutants (méthode personnelle de Audrey Chids-Mee) ; pratique de la langue, avec Robert Lloancy ; étude de textes, avec Robert Mollisson, et peut-être d'autres ateliers, en particulier de traduction. Pendant la semaine du 15 au 20 juillet, S-ino Chids-Mee consacrera ses activités à un « seminario » destiné à ceux que sa méthode d'enseignement de l'espéranto intéresse. Enfin, la troisième période sera une reprise de ce qui a été fait l'an dernier, les activités principales étant manuelles et artistiques, l'étude et la pratique de la langue étant axées surtout sur les activités.

Comme chaque année, il est bon de répéter que les premiers inscrits sont plus sûrs de recevoir le logement qui leur convient le mieux. Cela ne signifie pas que nous réserverons à une personne seule inscrite très tôt la chambre pour deux personnes qu'elle convoîte !

P. BABIN.

INTER NI

La konsilantaro konstatis, dum la lasta kunveno, ke la situacio de la Esperanto-Domo, kvankam ne tiom bona, kiom ni esperis, ne estas malbona. Ĝi ebligos, ankaŭ ĉijare, kelkajn plibonigojn. Ni decidis konservi parton de la profito ĝis la fino de 1980 por aldoni ĝin al la venontsomera profito kaj tiamaniere disponi pri la sumo necesa por komplete refari la koridorojn de la dua etaĝo. Poste ni devos zorgi pri la teretaĝo kaj daŭrigi la instaladon de la kursoĉambroj.

La prelegoj prezentotaj venontsomere estos certe interesaj kaj eĉ pripensigaj kaj diskutodonaj. Krom la kutimaj diversnivelaj kursoj okazos seminario pri rektmetoda esperanto-instruado, fare de S-ino Childs-Mee kiu prezentos ankaŭ sian personan metodon. Dum la tria periodo, kiel lastan jaron, la ĉefaj aktivaĵoj estos manlaboraj kaj artaj sed la lingvo de interkomunikado estos kompreneble la internacia. Ankaŭ kursoj akceptos la interesatojn.

Informpetoj alvenas laŭ la kutima ritmo. Ne tro atendu. Informpetu kaj aliĝu rapide.

Un chef-d'œuvre de la littérature
Une traduction hors pair

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de MAUPASSANT

Prix de l'exemplaire relié : **36 francs.**

30 % de réduction à partir de trois exemplaires.

FONDUSO « FOTOKOPIILO »

Total précédent :	2.561
Sro Lafargue	150
Sino Turin	100
Sro Lentaigne	38,60
Nouveau total :	2.849,60

NOS PEINES

Le 28 janvier, nous avons appris le décès de Clément-Eloi Motillon, de Tours. Cette disparition nous touche beaucoup. M. Motillon était un ami fidèle de la Maison Culturelle et un collaborateur très apprécié de « Kulturaj Kajeroj ». Ses 85 ans ne l'empêchaient pas de garder un esprit curieux et une grande clarté de jugement dont il faisait profiter ses amis. Il aurait mérité sans doute d'être encore plus largement connu, mais sa discrétion naturelle se refusait à tout tapage.

Que sa famille, que ses amis espérantistes tourangeaux trouvent dans les pages de cette revue qu'il a aimée et enrichie le témoignage de sympathie des membres du Conseil d'administration de la Maison Culturelle.

Gesinjoroj Babin kaj la Esperanto-Domo dankas ĉiuj geamikojn kiuj sendis bondezirojn. Ili amike kaj elkore reciprokas ilin kaj bedaŭras, ke ili ne povas respondi al ĉiuj.

RÉUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 28 OCTOBRE 1979

La séance est ouverte par le président, à 10 h.

Sont présents : Mmes Chevery, Mathé (représentée par Florent), Prévot, MM. Babin D., Bodereau, Boyet, Ciret, Dairon, Jelenc, J.-P. Guillot, Métivier.

Se sont excusés : MM. Bénistant, Chevallier, Guillaume.

STAGES DE L'ETE :

J.-P. Guillot présente une étude statistique de la fréquentation au cours de l'été. Le nombre moyen de personnes présentes par jour permet de constater une légère diminution, de 1976 à 1979 :

1976	1977	1978	1979
70	67	60	60

Le nombre de nuitées a légèrement diminué, de 3.740 en 1978 à 3.728 en 1979. La durée des séjours est identique.

Les moyennes d'âge se répartissent comme suit selon les trois stages d'été :

1978 : 47 - 41 - 38
1979 : 40 - 45 - 32

Il y a donc une diminution de l'âge moyen, c'est-à-dire un rajeunissement : 76, 77, 78 : 42 ans ; 79 : 39,5 ans. La tranche d'âge la mieux représentée en 1979 a été celle allant de 10 à 20 ans.

Dominique Babin donne un bref compte rendu du premier stage. Les francophones ne représentaient pas la moitié des stagiaires. Quatorze nationalités étaient représentées. Les animations ne se sont pas déroulées tout à fait comme prévu, mais il y a eu trois soirées théâtrales intéressantes, dont deux assurées par des troupes extérieures à la Maison. Le programme des conférences s'est déroulé comme d'habitude. Deux cours ont eu lieu : cours de pratique de la langue et cours supérieur. La participation aux activités manuelles a été restreinte.

Le deuxième stage était consacré à l'étude de la langue. Mme Childs Mee a conduit le cours d'initiation, Mme Kristos a guidé la pratique de la langue, M. Mollisson s'est chargé d'une étude de textes et des conversations, et M. Ribot de traductions et grammaire pouvant conduire au Kapableco. Les activités manuelles ont été peu suivies et les excursions par cars, devenues très coûteuses, n'ont pas pu avoir lieu.

Le troisième stage était consacré principalement aux activités manuelles et de loisirs. Tous les

stagiaires ont participé à cette nouvelle formule : photo, vannerie, danses, perles. Le but semble avoir été atteint. L'apprentissage de l'Espéranto s'est fait au cours des diverses activités. Quelques « touristes » attirés par la danse ont découvert l'Espéranto. La conduite du stage sous la direction de M. et Mme Mathé a été le fruit d'un travail collectif. Il semble que l'utilisation de l'Espéranto a été plus grande que les autres années. Certains participants ont appris à la fois la photo et la langue universelle. Le concours, qui a mobilisé plusieurs personnes, s'est terminé par une exposition et une remise de prix. Certains participants ont demandé la possibilité de faire de la photo en couleur. Il n'est pas possible actuellement d'exaucer ce vœu. En définitive, peu de participants étaient venus pour faire de la photo, mais plusieurs ont participé avec grand plaisir.

Le stage des aveugles n'a réuni que peu de monde. Il empiétait d'une semaine sur la troisième période. Cela a posé un problème, toute les activités n'étant pas adaptées aux non-voyants malgré leur désir d'y participer.

Pour la première fois, un petit groupe d'adeptes de la bicyclette s'est constitué et a fait des promenades.

M. Boyet fait part des difficultés qu'il rencontre à structurer un cours supérieur pour des élèves dont les motivations sont très diverses, certains désirant une préparation à un examen, d'autres une connaissance de la langue plus poussée pour des raisons plus « utilitaires ».

RESULTATS FINANCIERS :

Les résultats présentés par le trésorier sont évidemment provisoires. Ils montrent peu de changement par rapport à l'année précédente. Cependant, un autre séjour d'une semaine doit avoir lieu au mois de novembre.

Les salaires et charges sociales ont, bien sûr, augmenté, de même que les dépenses d'alimentation. Nous avons pu cette année encore poursuivre le remboursement de la dette envers certains sociétaires.

Les disponibilités sont, au 15 octobre, les suivantes : caisse, 4.236 F. ; C.C.P., 2.545 F. ; B.N.P., 8.731 F. ; Caisse d'Epargne, 83.637 F.

PROGRAMME 1980 :

● 6-13 AVRIL. — Rencontre internationale d'enfants. Pédagogie de l'Espéranto. Administration : M. et Mme Bodereau. Responsable du stage : Frédéric Le Magadure.

● 1er-21 JUILLET. — Conférences aux sujets très divers avec discussions et débats. Ateliers de pratique de la langue. Activités manuelles. Administration : M. et Mme Pierre Babin.

● 22 JUILLET - 11 AOUT. — Cours de trois niveaux. Mme Childs-Mee assurera le cours pour débutants (méthohde directe originale) ; M. Mollison guidera un cours de perfectionnement à partir d'une étude de textes (Pasoj al plena poseda). Activités manuelles. Administration assurée par M. et Mme Dominique Babin.

● 12 AOUT - 1er SEPTEMBRE. — Stage consacré particulièrement aux activités culturelles, manuelles et de loisirs : photo, danse, vannerie, éventuellement d'autres activités. Un cours pourra avoir lieu particulièrement axé sur la pratique de la langue dans les différentes activités. Administration assurée par M. et Mme Guillot.

Le président rappelle qu'une partie du Conseil d'administration doit être renouvelée en 1980. Il s'agit de Mmes Mathé et Micard, MM. Bodereau, Dairon, Guillaume et Jelenc.

TRAVAUX ET PROJETS :

La pompe est en panne depuis le début du mois d'août. La réparation risque de coûter cher. Un devis sera demandé pour amener l'eau du service jusqu'au château. Le branchement a été fait l'an dernier.

La réfection du couloir du second étage sera entreprise en septembre prochain pour des raisons pratiques, mais aussi financières. Une partie des fonds de l'exercice 1979 sera réservée pour compléter si besoin est ceux de l'exercice 1980, le coût des travaux devant être élevé.

Il est décidé d'acheter de nouvelles tables plus rationnelles pour les salles à manger. Les tables existantes seront placées dans les nouvelles salles de cours.

L'installation électrique des communs sera rénovée. De nouvelles vitrines seront installées dans la bibliothèque pour recevoir les livres à consulter et présenter les livres à vendre au Libro-Servo. L'achat d'un électrophone s'avère nécessaire.

Il a été suggéré de faire l'acquisition d'un matériel de photocopie et de reprographie. Ce matériel serait sans doute très utile à la Maison. Son fonctionnement pose un problème de personnel et son acquisition un problème de financement, du moins dans l'immédiat. Il est décidé de surseoir à cet achat et de maintenir la « Fonduso fotokopiilo ».

Le Comité d'Expansion du Baugeois organise un stage en novembre. Les Moulins des Apprentis demandent le soutien moral et éventuellement financier de la Maison Culturelle pour l'attribution d'un moulin aux espérantistes. Notre soutien ne peut être que moral. Il sera cependant actif, car *Kulturaj Kajeroj* auprès de ses lecteurs et la Maison Culturelle auprès de ses stagiaires feront connaître cette initiative.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 17 h.

Le secrétaire de séance : Guy DAIRON.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	15,00
Pendentifs	:	15,00
Pendentifs grosse étoile	:	25,00
Coupe-papier	:	25,00
Disques de stationnement	:	5,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	3,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 50 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **20,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

TRIGROŜA ROMANO

de **B. BRECHT**